



TEA-BULTENO

3^a JARO

JULIO 2000

NUMERO 7



AGENDO



- 1 S
- 2 D
- 3 L
- 4 M Ordigo de asocia arkivo
- 5 M
- 6 ĵ
- 7 V Sen-tema legado kaj babilado
- 8 S
- 9 D
- 10 L
- 11 M Ordigo de asocia arkivo
- 12 M
- 13 ĵ
- 14 V Via opinio pri TRIESTO 2001
- 15 S
- 16 D
- 17 L
- 18 M Ordigo de asocia arkivo
- 19 M
- 20 ĵ
- 21 V Marc Vanden Bempt kun ni!
- 22 S
- 23 D
- 24 L
- 25 M Ordigo de asocia arkivo
- 26 M
- 27 ĵ
- 28 V Kartluda vespero
- 29 S
- 30 D
- 31 L



La aktiveco de nia UEA Jarmila Forumo: por levi prilingvan konscion

De la 22^a ĝis la 26^a de majo, ĉirkaŭ 1300 homoj el 700 ne-registaraj organizaĵoj (NRO-oj) partoprenis en la Jarmila Forumo ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO estis reprezentita de prof. Lee Chong-Yeong kaj d-ro Mark Fettes kaj de la konstanta UN-representanto de UEA, Rochelle Grossman.

La Forumo estis iniciato de la NRO-oj mem, responde al la planoj de UN okazigi grandan pintkunsidon de ŝtatestroj (Jarmila Pintkunsido) en septembro 2000. La organizantoj esperis tiamaniere iom influi la interregistarajn diskutojn pri la estonteco de UN.

Kontraste al la oficialaj konferencoj, la Jarmila Forumo disponis pri tre malmultaj rimedoj - malpli ol duonmilionon da dolaroj - kaj neeviteble suferis reprezente kaj organize. Forestis multaj konataj NRO-oj, kaj grandaj partoj de la mondo ĉeestis nur per manpleno da homoj. Ankaŭ la diskutoj spegulis mankon de bona preparo, tiel ke nur tre malfacile ellaboriĝis, en la lastaj horoj, komuna konkludaro de la delegitoj.

Malgraŭ tiuj malfortoj, la UEA-grupo celtrafe laboris por levi la konscion pri lingvaj rajtoj kaj lingvaj problemoj. Disdoniĝis multaj centoj da informiloj, i.a. kajero kun la Manifesto de Prago en la ses oficialaj lingvoj de UN, kaj plurfoje en la pleno la delegitoj de UEA prenis la mikrofonon por atentigi pri lingva dimensio de la diskutoj. Fine, en la rekomendojn de du tem-grupoj, pri Homaj Rajtoj kaj Tutmondiĝo, ili sukcesis enmeti frazojn pri lingvaj rajtoj, la konservado de lingva diverseco kaj la bezono de egaleca interkultura komunikado.

En la lasta tago UEA aranĝis apartan kunsidon pri «Lingvo kaj Homaj Rajtoj», nome de la Koalicio de NRO-j por Internacia Helplingvo. Kvankam ĉeestis nur reprezentantoj de TRANSNACIA RADIKALA PARTIO, MOND-FEDERISTA MOVADO kaj ŜINTOISMO, la kunsido montriĝis tre utila por disvolvi komunan strategion en la rondoj de UN. Tre klare sentiĝas bezono de NRO-grupo, kiu konstante konsciigu pri la rolo de lingva diverseco en socia evoluo kaj monda demokratio, kaj kiu varbu aliancantojn inter la ŝtatoj same kiel ĉe la diversaj branĉoj de UN. Nur surbaze de tiu pli vasta konscio, la kontribuo de Esperanto povos ricevi pli vastan agnoskon kaj subtenon.

En la venontaj monatoj konkretiĝos agadplano surbaze de tiu ideo.

Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero

El Proverbaro de H. Zamenhof



El diversaj vidpunktoj

la mondo estas bela ĉar varia
Atilio Orellana Rojas klarigas, sekve de siaj spertoj kiel instruisto tra la tuta mondo, ke ankaŭ pri geografio, ĉio relativas, depende de unuopula opinio.

►Kiel vi scias, mi instruadis en multaj landoj de la mondo kaj ĉiam mi devas enkonduki kelkajn vortojn rilatantaj al geografio, ĉar tiel ni povas paroli pri «kie, de kie, kien», diskutigi la gelernantojn pri la loĝlando, kio helpas min dialogigi la gelernantojn, ktp.

En mia naskiĝlando, Argentino, oni instruis al mi, ke en la mondo estas 5 kontinentoj: Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo kaj Oceanio. En iuj aliaj landoj pluraj el miaj gelernantoj diris, ke la kontinentoj estas 6: Afriko, Azio, Eŭropo, Nordameriko, Sudameriko kaj Aŭstralio. Foje mi instruis al grupo de geografoj kaj ili diris al mi, ke la kontinentoj estas 6: Afriko, Antarktio, Eŭrazio, Nordameriko, Centrameriko kaj Oceanio. Foje en Aŭstralio iuj gelernantoj diris al mi, ke en la mondo estas 7 kontinentoj: Afriko, Antarktio, Azio, Aŭstralio, Eŭropo, Nordameriko, Sudameriko.

Nu, plej interese estas, ke mi ofte komencis paroli pri landoj kaj kontinentoj, por povi enkonduki la sufikson "-ano" (aziano, eŭropano, ktp), sed en Madagaskaro la lokaj enloĝantoj diras, ke ili estas oceanianoj, ne afrikanoj. En Burkina Faso mi foje babilis kun tuniziano, kiu asertis, ke li ne estas "afrikano", sed "arablingvano de Mediteraneo"; en Japanio miaj lernantoj diris, ke israelanoj ne estas "azianoj", ĉar "aziano" estas flavulo. En Panamo miaj gelernantoj diris, ke ili ne estas "centramerikanoj", sed "sudamerikanoj"; aliflanke en Kubo mi ricevis la informon, ke ili ja estas "amerikanoj", sed ne "centramerikanoj", nur "karibeanoj". En Norvegio miaj gelernantoj diris, ke ili ne estas "eŭropanoj", sed nur "norvegoj" (verŝajne pro tio, ke Norvegio ne volas aliĝi al EU kaj eĉ oni reklamas surstrate pri *malaltprezaj flugoj al Eŭropo*).

Kiom da kontinentoj en la mondo ekzistas, fine, mi mem ne scias, ĉar - laŭ la landoj - la geografiaj konceptoj estas foje tre malsimilaj, ... kaj eĉ por instrui "-ano" mi tamen daŭre uzas la saman taktikon, kiun mi priskribis, ĉar tio permesas al mi ne nur paroligi la homojn kaj ke ili uzu Esperanton por klarigi sian penson, ĉu ili estas "eŭropanoj", "azianoj" aŭ io ajn, sed ankaŭ por enkonduki temon, kiu ne estas tiom tuŝita en niaj Esperantolecionoj, tio estas la interkulturaj aspektoj kaj la bezono pri ia transkultura mondkoncepto.

Esperanto ĉe McDonald's

La plej fama - en la mondo - sandviĉ-terpom-ktp-distribua reto MCDONALD'S, ĉirkaŭ en la tago de la amindumantoj, kiun, en Brazilo, oni festas la 12^{an} de junio, decidis ornamati siajn pleto-tukojn (el papero!) per am-deklaroj en diversaj lingvoj.

Inter la 24 land-nomoj, trialoke, meze en la supra parto, troviĝas: MI AMAS VIN! dirita de paro, hipie vestita kaj faranta la pacosignon. Sube, anstataŭ la land-nomo, legblas: Esperanto. Flanke, per malgrandaj nigraj literoj: «Idiomo kreita por esti parolata de ĉiuj popoloj».



Internacia Esperanto-Instituto 70-jara

La 24^{an} de majo 1930 Andreo CSEH kune kun gesinjoroj ISBRUCKER fondis la INTERNACIAN CSEH-**INSTITUTON DE ESPERANTO** en Nederlando. Tiam la celoj de la Instituto estis vortigitaj tiel: «Disvastigi Esperanton pere de Cseh-metodaj kursoj, prepari taŭgajn instruantojn, helpi ilin kaj la kursarangantajn esperantistajn organizaĵojn per la necesa instru-materialo kaj konsilado».

La unua Direkcio estis plenumita de Andreo Cseh mem kaj de Julia Isbucker: ĝi havis konsilantaron konsistantan el gravaj personecoj de la tiam Esperantio, kiel Edmond Privat, Felix kaj Leono Zamenhof, ktp kaj estis samtempe starigitaj sekretariejoj en Estonio, Hungario, Latvio, Nederlando, Norvegio kaj Svedio.

La unua agado de la Instituto estis organizi Pedagogian Seminarion, kiun ĉeestis 200 personoj el 20 landoj kaj, fine de ĝi, la grupo karavane vojaĝis al la 22^a Universala Kongreso en Oksfordo.

Andreo Cseh disvastigis la metodon, kiu poste famiĝis en la Esperanto-medio per la nomo de ties iniciatinto. En la 30^{aj} jaroj la Instituto kalkulis je aro da 300 diplomitaj instruistoj, kiuj vojaĝadis instruante la lingvon: Julio Baghy, Lidja Zamenhof, Erika kaj Henrik Seppik, Lizzie kaj Tiberiu Morariu, Carl Stop-Bowitz, kaj multaj aliaj.

En decembro 1933 la Instituto akiris sian propran sidejon en la urbo *Den Haag* kaj, ĝis hodiaŭ, ĝi funkcias en la sama loko. La inaŭguron ĉeestis lokaj gravuloj kiel la skabeno pri instruado en *Den Haag*, reprezentanto de la nederlanda ministro pri instruado, ktp.

Ekde la jaro 1952 la Instituto ŝanĝis sian nomon al Internacia Esperanto-Instituto (IEI). Jam pasis 70 jaroj de vivo de IEI. En tiu periodo ĝi abunde agis en diversaj kampoj. Certe la Cseh-metodo estas la plej konata metodo en Esperantio. IEI nuntempe kalkulas je diplomitaj Cseh-instruistoj en 5 kontinentoj, kiuj prizorgas la vivantecon kaj aktualan uzon de la metodo.



En la eldona kampo IEI montriĝis jam tre aktiva ekde tiuj fruaj jaroj kun eldonaĵoj kiaj «La libro-konstantaĵo de fila pieco» aŭ «Karlo», «La lernolibro de la vivo», «La centa simio», «La alia pasinteco», ktp.

Certe la plej grava estas la verko «Baza Cseh-Kurso», unuafoje eldonita en tiu frua periodo kaj kiu jam atingis sian 8^{an} eldonon; la alia elstara aperintaĵo estas la instru-filmo kun ties apoga materialo «Mazi en Gondolando» lanĉita okaze de la centjara datreveno de Andreo Cseh en 1995.

Inda je mencio estas ankaŭ la aperado de la revuo **LA PRAKTIKO**, kiu dum jaroj estis la ĉefa ligilo por la Cseh-instruistoj kaj taŭga lernomaterialo por la lernantoj en la kursoj.

IEI daŭre organizas kursojn por lerni la lingvon kaj metodikajn seminariojn por eduki novajn instruistojn en la uzado de la rekta metodo. Ĉiujare deko da Seminarioj okazas en la mondo, kie la instruistaro povas ricevi tiun fakan scion. IEI ankaŭ okazigas specialan trejnadon por gvidi Seminariojn pri Cseh-metodo.

Informis: Atilio Orellana Rojas - iei001@uorlondonline.nl

Tie kaj tie pluketante... *Zorge de Elda Doerfler*

Kiel sciante, Eŭropa Parlamento akceptis la proponon dediĉi la jaron 2001 al la lingvoj kaj la Asembleo alvokis, por ke oni altiru la publikan interesigon pri la neceso kaj avantaĝoj de sciado de fremdaj lingvoj, precipe kiel iloj kontraŭ rasismo kaj prikultura maltoleremo. Konsiderante ankaŭ la fakton, ke pli kaj pli kreskas kaj kreskos la nombro de ŝtatoj aliĝantaj al Eŭropa Unio, la Asembleo ja tute priatentas la problemon de absoluta nediskriminacado de la diversaj lingvaj familioj, por doni apartan privilegion al neniu ajn. Ĝi krome sugestas, ke specifa atento estu direktata al infan- kaj element-lernejoj, ĉe kiuj studado de lingvoj malfermas la mensojn al kulturaj diversecoj.

La Parlamento, siaflanke, insistas pri la nepreco, ke studentoj lernu minimume du lingvojn dum minimuma periodo de du jaroj, rekonante tamen al la Ŝtatoj la decidrajton inkludi, en la lerno-programojn, idiomojn ne apartenantajn al eŭrop-uniaj membroj, kiel ekzemple la greka kaj latina lingvoj.

Tia argumentado certe estas plensignifa kaj apoginda, sed ĉu oni entute konscias, ke vere ĝi estas tiel facile realigebla? Sen konsideri la tutan tiurilatan problemaron, de ĉiuj tre bone konata kaj ĉiuokaze diskutata, ni ekzemple nur pripensu pri la propono kiu tiel tekstas: «Lerni almenaŭ du lingvojn dum minimume du jaroj». Sed tio kian rezulton donos?

En la reto aperis, rilate al tio, la ĉi-suba mesaĝo de Ulrich Matthias, interesa kaj (eble?) sekvinda:

Eŭropa jaro de la lingvoj 2001: Ĉu Esperanto povas esti subtenata?

Sur la retpaĝoj de la Eŭropa Jaro de la Lingvoj 2001 (en angla lingvo sub <http://europa.eu.int/comm/education/languages/actions/year2001.html>) troviĝas informoj pri la lingvoj, kies lernadon Eŭropa Unio planas kuraĝigi kadre de tiu ĉi Eŭropa Jaro. Laŭ tiuj ĉi informoj temas ne nur pri la oficialaj lingvoj de EU, sed ankaŭ pri ĉiuj lingvoj – inkluzive de la regionaj, minoritataj kaj gestaj – «kiujn la membroŝtatoj de Eŭropa Unio trovas subtenindaj».

Mi retroŝte demandis – nome de HESA ESPERANTO-LIGO – ĉe s-ro Thiele, la kontaktpersono de Germana Ministerio pri Edukado kaj Esplorado, ĉu ankaŭ esperanto povus esti unu el tiuj ĉi subtenindaj lingvoj. La respondo estis, ke oni decidis pri tio fine de junio.

Povus esti utile, se ankaŭ homoj el aliaj membroŝtatoj de Eŭropa Unio frue demandus, ĉu principe ankaŭ Esperanto povus esti “konsiderata” kadre de la Eŭropa Jaro.

Kongreso de dialogo - UK-2001

Laŭ decido de la ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, la jaro 2001 estos Internacia Jaro de Dialogo inter Civilizoj. La Loka Kongresa Komitato de la 86^a UK en Zagrebo proponis al la estraro de UEA dediĉi la temon de la kongreso al tiu Internacia Jaro. La estraro unuanime akceptis la proponon de LKK kaj vortumis la temon kiel «Kulturo de dialogo - Dialogo inter kulturoj».

Lastminute ITALA ESPERANTO-FEDERACIO akceptis la proponon de TEA organizi en Trieste la Italian Kongreson en la 2001^a jaro. Abundus informoj en la aŭgusta bulteno.

Eŭropa opinio pri Esperanto

Germain Pirlot sendis siajn bondezirojn, ankoraŭ en decembro pasintjara, al Romano Prodi, prezidento de Eŭropa Komisiono. Li ricevis la jenan respondon:

«La prezidento de la Eŭropa Komisiono, S-ro Romano Prodi, komisiis al mi danki vin pro via afabla letero de la 17^a de decembro 1999, per kiu vi sendis al li, kaj al lia familio, viajn bondezirojn por 2000.

La Prezidento estimas vian agadon pri eŭropa konstruado kaj vian intereson pri la uzado de la lingvoj. La eŭropa konstruado celas ja starigi pacon kaj respekton de la kultura identeco de ĉiuj eŭropaj civitanoj. Kvankam Eŭropa Unio estimas la strebojn de ĉiuj, kiuj promocias esperanton, ĝi elektis alian solvon, elektante 11 oficialajn lingvojn.

Tiu egaleco en la diverseco certigas, ke estu gardata la riĉa kultura kaj lingva heredaĵo, kiu karakterizas Eŭropon. Por altigi la lingvan scipovon de la eŭropaj civitanoj, pliaj klopodoj helpas, ne nur por ke tiu heredaĵo estu ankoraŭ pli atingebla, sed ili plifortigos ankaŭ la kohercon kaj la reciprokan komprenon ene de Eŭropa Unio.

Mi bondeziras ankaŭ al vi, kaj al via familio, feliĉan novjaron kaj estime salutas vin,

David Lipman, prezidanto de Eŭropa Komisiono

Ni savu ZEO-n!

La 25^{an} de junio sur la *Vadomar*-insulo *Texel* estis inaŭgurita Esperanto-Monumento antaŭ nelonge restaŭrita. Komence la Komunumo *Den Burg*, la “ĉefurbo” de la insulo, plene subtenis tiun iniciaton, sed, post tre malfavora artikolo en la loka gazeto **DE TEXELSE COURANT**, la urba estraro retiriĝis, argumentante ke la angla jam fariĝis la tutmonde akceptita internacia lingvo kaj sekve Esperanto fariĝis eksmodaĵo.

La celo de nia kampanjo estas, ke oni amase skribu simplan gratulleter(et)on pro la iniciato reinaŭguri la monumenton, tiel konatan en la tuta mondo inter la esperantistaro kaj unufoje inaŭguritan antaŭ 65 jaroj, kaj samspecan leteron al la Kolegio de Urbestro kaj Skabenoj en *Den Burg*.

La adreso de la kolegio estas:

College van Burgemeester en Wethouders


Postbus 200 - NL-1790 AE Den Burg - Nederlando.

Bonvolu skribi en Esperanto, kun angla, franca aŭ germanlingva resumo. Same al la gazeto **DE TEXELSE COURANT**: retadreso - tcnieuws@tref.nl. Tiel ke kaj la gazeto kaj la Komunuma Estraro estu inundataj de gratulleteroj de ĉie ajn en la mondo, por ke ili sciu, ke Esperanto ankoraŭ vivas kaj restos vivanta.

Interese estas, ke la monumento estis farita de Tekselano-esperantisto. Konsciante pri la sinteno de la nazioj rilate al nia lingvo, oni dum la milito malkonstruis ĝin kaj kaŝis la pecojn. Post la milito la konstruinto de la monumento revenis sur la insulon kiel angla soldato kaj rekonstruis ĝin pli bele ol ĝi iam estis. Nun ĝi do bezonis drastan riparon post tiom da jaroj.

Ni esperas, ke vi bonvolos kunlabori kaj dissendi ĉi tiun mesaĝon al viaj geamikoj tra la mondo, ĉar ju pli da leteroj des pli bone. Eĉ pli bone se la letero(j) estos subskribitaj de kiel eble plej multe da esperantistoj.

Informis: Ru Bosson - bosson.gesperanto@hetnet.nl



Mikologia Klubo Internacia

Per Esperanto al fungoj per fungoj al Esperanto

Naskiĝanta esperantista organizo de natur- kaj fungo-amikoj lanĉas programon:

«**KUNE KUN** natur- kaj fungo-amikoj neesperantistaj» por permesi al homoj de diversaj landoj pliriĉigajn spertojn en interamikiĝa etoso per internaciaj renkontiĝoj dum kiuj, sen granda streĉo por interkompreniĝi, oni uzu la plej simplan rimedon por komuniki: Esperanton, instruatan tuj **antaŭ** la forveturo kaj **dum** la kunestado per esencaj lecionoj kun terminologio natura kaj mikologia.

La unua aranĝo de **MKI** disvolviĝos en Poprad (Slovakio) inter la 4^a kaj 20^a de aŭgusto, kiel internacia laboratorio, bazita sur binomio «lingvo-naturo» laŭ itineroj evitantaj komplikaĵojn kaj ĉerpante el vortprovizo esenca por praktika neceso kaj deziro interŝanĝi konojn por distingi fungojn kaj observi la kreskaĵojn. La naturo estas tiu de unu el la plej belaj scenejoj montaraj de Eŭropo: Slovaka Paradizo, Altaj Tatroj kaj aliaj magiaj naciaj parkoj.

Kostoj tre malaltaj: ĉirkaŭ 20 **DEM** tage por loĝi kaj manĝi. Dum la aranĝo, se ĉeestos sufiĉe da interesitoj, fondiĝos oficiale **MKI**. Nun ni urĝe serĉas kunlaborantojn por disvastigi la iniciaton en mikologiaj kaj ekologiaj medioj, por eventuale aranĝi etajn karavanojn, instrui iom la lingvon antaŭ forveturo, kontribui al kulturaj vesperoj. La iniciato alkrutiĝas al du el la jam tradiciaj aranĝoj de Poprad: **SOMERA ESPERANTO-LERNEJO** (4-17/08) kaj **TURISMA SEMAJNO** (13-20/08) sed la programo estos adaptita al la nombro de la partoprenantoj.

Kontaktoj: pri ĝenerala organizo - Giorgio Bronzetti
V.le A. Moro 37- It-66013 Chieti - Tel. 0871561301
mikoklubo@infinito.it

Pri itala karavano - Emidio Di Giammarino
Via Scanno 12 - It-66013 Chieti - Tel. 0871563575
dp001769@flashnet.it

Pri aliĝo kaj restado - Inĝ. Milan Zvara
Sobotské nam. 36 - SK-058 01 Poprad - Slovakio
milanzvara@nextra.sk

ESPLORVOJAĜO de Jules Verne

ESPERANTO RADIKALA ASOCIO (ERA) prezentis sian lastan eldonadon: «Viaggio di studio - Esplorvojaĝo - Voyage d'etudes», nefinita romano de *Jules Verne* en kies paĝoj ankaŭ Esperanto estas pritraktita. La teksto kun notoj kaj multaj aŭtoraj rimarkoj aperas en la franca originalo, en la itala kaj Esperanta tradukoj. La asocio aĉetis la eldonrajtojn de tiu teksto por itala kaj esperanta tradukoj. Sur la koverto, originalaj neeldonitaj desegnaĵoj de *Giordano Falzoni*, forpasinta artisto (pentristo kaj aktoro, plurfoje aperinta en filmoj de Fellini). **ERA** prezentis ĝin la 19^{an} de majo, enkadre de grava manifestacio okazinta en *Parma*, dediĉita al Jules Verne. Organizita de la skabeneco pri Kulturo, ĝi estis titolita: «Ekspedicio Jules Verne: eksterordinara vojaĝo». La 160-paĝa libro, kiu ricevis varmajn aprobojn flanke de la respondeculoj de tiu manifestacio, kostas 10,33 € (20 000 **ITL**) kaj jam nun oni povas ĝin mendi al **ERA**, Via di Torre Argentina 76, Romo (Italio) aŭ retpoŝte ĉe era@internacilingvo.org.

Mallongete...

→ Ni, geklubanoj el *Ceska Trebova* (Ĉeĥio), deziras gaje ekpasi novan miljaron. Dum solena adiaŭo kun nuna miljaro ni aranĝos letervesperon. Bonvolu, sendi al ni belan bildkarton el Via lando ĝis fino de novembro 2000. Unu el vi estos balotade elektita kaj povos travivi senpage unu semajnon en nia urbo (escepte de vojaĝkosto). Ĉiu sendinto de salutbildkarto ricevos Esperanto-bildkarton de nia urbo. Jen la adreso:

Anna Pistorova - Nove nam. 1746
Cz-560 02 Ceska Trebova

→ Novaĵoj pri nova PIV

La laboro pri la nova **PLENA ILUSTRITA VORTARO** bone evoluas. Plejversajne ĝi aperos ĉi-jare. Vere ilustrita, ĉar la bildoj troviĝos en la teksto mem. **SENNACIA ASOCIO TUTMONDA** starigis fonduson por subteni la laboron. La eldonkostoj de nova **PIV** estas vere altaj, pro tio kiu povas helpi, bv. sendi la monon al «**PIV - Komitato de SAT**» banka kontonumero: 30041-00001-0123422K-020-39, Paris, menciante «Por la fonduso de **NOVA PIV**»

→ Labordungoj pere de Esperanto

Ni serĉas fakan artiston kiu povus konstrui vitralojn (fenestro de preĝejo). Petu la desegnon por fari vian prezon al:

TAKE-ESPERANTO
90, Rue du Tiefenbach - FR-68920 Wintzenheim
Fakse: 00333.89.79.43.33
Rete: 100623.3022@compuserve.com

→ Konstrua Entrepreneo **CL-BATIMENT** dungas masonistojn kaj ĉef-masonistojn por labori en Alzaco-Francio. Longdaŭra kontrakto. Nepre bezonatas laborrajto en Eŭropa Komunumo. Lingvoj: franca, itala, portugala aŭ Esperanto. Kontakto: **TAKE-ESPERANTO** (vidu supre).

→ Tagoj de Esperanto en Kongo

Okaze de la 40^a datreveno de la sendependiĝo de D.R. Kongo, **KONGA ESPERANTO-RONDO** organizas tri tagojn de Esperanto, de 30.06 ĝis 02.07.2000. Pro tio, estos bonvenaj de la esperantistaro objektoj kiaj flagetoj, insignoj, E-muzikkasedoj, afiŝoj, glumarkoj, poŝtkartoj, poŝtmarkoj, videofilmoj, do, ĉiaj esperantaĵoj bezonataj dum ekspozicioj. Ĉion sendu al jena adreso:

B.P. 6055 Kin VI
Kinshasa - R.D.Congo
Fax : 00 32 2 7065667
ker@mail.aton.cd

→ Estis preparita didaktika **KD** pri Esperanto-instruado de Aleks Dematheis. Ĝi estas utila prefere por instrui nian lingvon al angloj, francoj, germanoj, hispanoj, italoj kaj portugaloj, sed oni povas utiligi ĝin ankaŭ por aliaj lingvoj. Ĝin eldonis **E-Centro** de Torino, Italio.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it
Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtekkonto N° 10834349